Provenca
Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
145
somero 2026

espéranto Provence

Leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

Federacia retejo
provenco.esperanto-france.org

Prezidanto
Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

Aliĝkotizo (kun la gazeto) : 12€
> ĉeko al : Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Marc Gallardo
Les Hespérides II Bât. B2
67 bd des Alpes- 13012 Marseille
gallardomarc@ymail.com
06 09 89 09 14
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo devas esti pagita al Esperanto-France
https://esperanto-france.org

Redaktoro
Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93
ilarione13@outlook.fr

Grafikistino
Mh Bertucceli
mhbertucceli@gmail.com

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°
15-a de septembro 2026
bonvolu sendi al la supra retadreso

★ ★ ★

antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

Vorto de la Presidantino

La internaciaj novaĵoj ĉiutage memorigas al ni, ke nia mondo travivas multajn streĉojn: militojn, klimatajn krizojn, identecajn retiriĝojn kaj malfacilaĵojn dialogi, malgraŭ la senprecedencaj komunikrimedoj disponeblaj al ni.

Sed ĝuste en tiaj tempoj la rolo de niaj asocioj fariĝas des pli grava.

Tion bele montras ankaŭ ĉi tiu numero.

Vi trovos raportojn pri naciaj renkontiĝoj, novaĵojn pri la preparado de la Eŭropa Kongreso 2027, kiun nia federacio havos la honoron organizi en Provenco, artikolojn pri daŭripova turismo, pri naturo, kulturo kaj lernado de Esperanto, sen forgesi la pli malpezajn paĝojn, kiuj ankaŭ kontribuas al la plezuro legi nian revuon.

Vi legos ankaŭ omaĝon al tiuj, kiuj sindone transdonas siajn sciojn. Lingvo vivas nur danke al tiuj, kiuj ĝin instruas, uzas kaj disvastigas. Ilia ofte diskreta laboro ebligas al novaj esperantistoj aliĝi al nia komunumo jaron post jaro.

Mi deziras al vi agrablan legadon kaj esperas, ke ĉi tiu numero instigos vin partopreni niajn agadojn, diskonigi Esperanton ĉirkaŭ vi kaj, kial ne, aliĝi al la granda aventuro de la Eŭropa Kongreso 2027.

Mi deziras al vi ĉiuj belan someron.

Rosy Inaudi
Presidantino de Esperanto-Provence

Fokuso

Gesinjoroj, amikoj,

Jen, somero estas tie. Mirinde. Ni ŝatas la naturon, ĉiuj, kaj plaĉas al ni promeni en la kamparo, pluki florojn, aŭskulti birdojn, senti la herbon, vidi la sunon per la arboj….. La poeto parolas ankoraŭ pli bone ol mi….. Sed ni devas iri transe de la emocioj, pripensu….

La naturo estas en danĝero pro la aktiveco de la homo: la poluado detruas, iom post iom, nian planedon. La ĉefa kialo estas la troa eligon de premgaso (forceja efiko). La scienco metis, antaŭnelonge, vorton pri la kialo de la poluado.

Hodiaŭ ni devas trovi kiel eviti kiel kontraŭi, ĝi estas problemego. La mondo verŝajnas preni konscion pri la problemo sed ĉiuj landoj ne havas la samajn solvojn: kun la konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por la klimato (COP) en Brasilo (novembro 2025) ni vidis: oko de batalo tra riĉaj landoj kaj malriĉaj landoj, komunaj bonoj kontraŭ propraj bonoj, financadoj aŭ energi interŝtupo, ekologia interŝtupo; en 2026 la COP havos presidantojn el Turkio kaj Aŭstralio…

Pensu ĉefe pri profeta mesaĝo de Sinjoro ZAMENHOF: ĝoji belan spekton de la tero ĉiuj KUNE.

Pascal Panarotto

Enhavo

3	Dankon Renée! Nova organizaĵo de Esperanto-Marseille
4	Nacia kongreso en Hérouville
5	Eŭropa kongreso en Carry-le-Rouet
6-7	Informoj kaj ekzamenoj
8-9-10	Filozofio aŭ ne
11	Naturistaj esperantaj agadoj pliiĝas en 2026!
12-13	Kvar prelegoj de Thierry Spanjaard
14-15	Blekoj el bestoj
16-17	Falsaj amikoj
18	Facila krucvortenigmo
20	Recepto
20	Agendo



Dankon Renée!
Kaj nova organizaĵo de Esperanto-Marseille

Thierry Spanjaard
Prezidanto Esperanto-Marseille

Ekde kiam mi aŭdis pri Esperanto en nia regiono mi aŭdis pri Renée Triolle. Ŝi estas la instruisto de Esperanto por generacioj de nunaj parolantoj de la internacia lingvo. Mi pensas, ke inter la legantoj de ni gazeto, neniu ne konas Renée. Ŝi dediĉis grandan parton de sia vivo al Esperanto kaj grandan parton de sia tempo al Esperanto-instruado.

Dum la lastaj jaroj, Renée ĉiun semajnon instruis ĉiun merkredon en La Ciotat kaj ĉiun ĵaŭdon en Marsejlo. Tiu signifis, ke ŝi devis ĉiun semajnon foriri de sia hejmo, iri aŭtomobile al la busstacio en La Ciotat, veturi buse ĝis Marsejlo kaj piediri ĝis la CIRA, kaj same por reveni. Ĉar Renée ĉiam timas elĉerpi siajn dokumentojn, ŝi portis multajn kilogramojn da papero sur sia dorso ĉiun semajnon.

Dum la lastaj monatoj, Renée ekdiris: mi iom laciĝas, mi ne plu havas kuraĝon veni al Marsejlo ĉiun semajnon, ĉefe vintre. Do ni devis trovi novan rimedon por instrui Esperanton en Marsejlo.

Ekde septembro, du kursoj okazos ĉiun semajnon en Marsejlo:

• Didier gvidos kurson por komencantoj kaj komencintoj ĉiun ĵaŭdon de la 18-a ĝis la 19-a en la Asociodomo, 93 La Canebière, 13001 Marseille,

• Thierry gvidos konversacian rondon ĉiun mardon de la 18-a ĝis la 19-a en CIRA, 50 rue Consolat, 13001 Marseille, kunfandante la ĝisnunajn grupojn de ĵaŭdon kaj mardon.

La unua paŝo al tiu nova organizo estos lanĉo-kunveno de la jaro, kiu okazos ĵaŭdon la 10-an de septembro je la 18-a en la Asociodomo.

Se multaj el la redaktantoj kaj la legantoj de tiu ĉi gazeto scipovas Esperanton, ni ŝuldas ĝin al Renée. Dankon al ŝi!

Kaj ni esperas daŭrigi tiujn belajn klopodojn!

Nacia kongreso en Hérouville : nur tri sed tre aktivaj

Renée Triolle

Nur tri esperantistoj el Provenco veturis al Hérouville (nova urbo ĉe Caen) sed ili ĉiuj ne nur ĉeestis, kun 140 homoj, (inter ili Aŭstralianoj, Kanadano, Germanoj, Italoj ktp) sed partoprenis! Bernard Bigonnet gvidis kantprovojn, kaj ĝojis, ke sufiĉe harmonie distribuiĝis la voĉoj: tri sopranoj, tri altoj kaj 4 viraj voĉoj! Nacia kongreso konsistas el diversaj programeroj, i.a laborkunsidoj (Membro-kunveno, komitatkunsidoj ktp) Thierry Spanjaard reprezentis Provencon kaj bone varbis por niaj aranĝoj : novembra staĝo en La Garde, MES en les Issambres kaj Eŭropa kongreso en Carry le Rouet. La belaj varbiloj rapide elĉerpiĝis!

Alia parto estas konigo de la gastiganta regiono, ĉijare Normandio kaj, ĉu amuze? provencanoj prelegis pri ĝi: Thierry Spanjaard pri normandaj fromaĝoj, kun surloka gustumado: granda kofro, donaco de la Komerca ĉambro, plena je fromaĝoj rapide malpleniĝis! (la organizantoj imagis, ke restos por la pikniko, tute ne!). Renée Triolle prelegis pri la kultura festivalo Borealoj, kiu konigas la verkistojn de Skandio kaj ankaŭ de Baltio. La Universitato de Caen estas la sola, kie estas instruataj skandiaj lingvoj. Ĉu pro la Vikingoj? Ĉu pro la helpo de Norvegio en la liberigo la 6-an de Junio 1944 ?.

Pro bona laboro de la Esperanto-klubo, la urbo grandskale kontribuis per disponigo de salonoj, de aŭtobusetoj, pago de biletoj en la kinejo ktp! La LKK organizis rektan videoligon kun la finna reĝisorino de la filmo «Patrinoj» kaj kun la Prezidanto de UEA, kiu premiere anoncis, ke la UK en 2028 okazos en Vilniuso! Terura manko estis papera programo, eĉ se la programo estis afiŝita iom post iom! Ni ankaŭ notu la antaŭan kolokvon en la universitato pri «Matematiko kaj Esperanto»; multaj aliaj programeroj estis malfermitaj al ne-esperantistoj: lingvo-kursoj, spektakloj.





Eŭropa Kongreso de Esperanto 2027 okazos de la 14-a ĝis la 17-a de majo 2027 en Carry-Le-Rouet, Provenco, Francio

La venonta Eŭropa Kongreso de Esperanto okazos de la 14-a ĝis la 17-a de majo 2027 en Carry-le-Rouet, pitoreska mediteranea urbeto apud Marsejlo, en la koro de Provenco. La kongreson organizas Esperanto-Provence kaj Esperanto-France, kune kun eŭropaj partneroj, por krei internacian renkontiĝon de esperantistoj el la tuta kontinento. La programo kunigos asociajn kunvenojn, prelegojn kaj kulturajn aranĝojn ĉirkaŭ la kongresa temo “Esperanto: lingvo por daŭripova turismo kaj interkultura kompreniĝo”. Eblos ankaŭ malkovri la naturajn kaj kulturajn trezorojn de Provenco dum ekskursoj. La kongreso enkondukos novan organizan modelon: la aliĝkotizo inkluzivos loĝadon en komforta marborda hotelo, ĉiujn manĝojn kaj plenan aliron al la tuta kongresa programo. Por tiuj, kiuj volas plilongigi sian restadon, estos organizita postkongreso kun pliaj ekskursoj kaj vizitoj al la ĉefaj vidindaĵoj de la regiono. Jam nun rezervu la datojn en via kalendaro! Aliĝado komenciĝos meze de oktobro, kun favorprezaj fruaj aliĝkotizoj. Ĉar la nombro da lokoj estos limigita, indas ne prokrasti. Ĉiuj detaloj aperos iom post iom en la kongresa retejo:

https://kongreso2027.esperanto-france.org

Vizitu ĝin ofte!

Nia prelego pri la EK27 dum la UK en Graz okazos vendredon la 7-an de aŭgusto, de 11:30 ĝis 12:15 en salono Moerbeek. Tuj rezervu la daton en via kalendaro!

Senpaga ekspozicio
exposition gratuite

Renée Triolle



Mi tenas je via dispono foto-ekspozicion, facile munteblan. Ne hezitu ĝin proponi al bibliotekoj, lernejoj, kulturaj centroj.

Dans les années 30 un ouvrier, Lucien Peraire, part en vélo de Brest vers l'Asie. À Moscou il fabrique un vélo pour pédaler sur les rails du transsibérien (il n'y a pas de route en Sibérie). Il va jusqu'au Vietnam et au Japon. Les 4000 pages de notes, dessins, documents ont été traités par le CNRS et vous sont proposés sous forme de photos horizontales à afficher.

Dans une boite de 63 x 45 x 6 cm de 3,5 kg, vous trouverez 9 photos horizontales et 6 photos de 63 x 45 cm, les pinces à linge pour les fixer sur des cimaises, des cartes-postales représentant Lucien sur son drôle de vélo et un stock de dépliants sur le voyage, le tout calé par 4 coussins de calage.

L'exposition est à réserver
chez Renée Triolle,
triolle.renee@wanadoofr. aux dates
qui vous conviennent.
Profitez-en !

Nekrologo

Des amis de l'espéranto nous ont quittés : Edgard MORIN, ce penseur ouvert sur le monde a soutenu la candidature de Christian Garino aux élections européennes et participé à une rencontre à l'UNESCO organisée par Universala Esperanto-Asocio.

André SANTINI, au ministère de la culture a assisté à une représentation à Issy les Moulineaux dont il était maire. Dans le cadre du Festival Théatre-Chansons organisé par Esperanto-France dont j'étais présidente et m'a demandé un dossier sur l'espéranto à transmettre à son collègue à l'éducation.

René Ballaguy, très engagé dans la campagne «L'Espéranto au Baccalauréat» a fait partie de la délégation qui s'est rendue au ministère de l'Education.

Renée Triolle

Examens d'Espéranto

Renée Triolle

Examens d'espéranto : les Français se voient proposer deux types d'examens : les examens de l'Institut Français d'Esperanto (3 niveaux dont le Kapableco pri Pedagogio, pri Turismo, pri Sciencoj qui jugent la connaissance de la langue et la culture du mouvement), et les examens du Cadre Européen de Référence (KER-ekzamenoj) alignés sur les examens européens, gérés par l'université hongroise Elte.

A1, niveau découverte (pour l'espéranto, M10) ;

A2 survie ;

B1 niveau seuil (M11 ou Cours Rationnel) ;

B2 (niveau autonomie, M12) ;

C1 niveau efficacité ;

C 2 niveau maitrise ;

N'hésitez pas à les passer, vous n'avez rien à perdre, sauf les quelques euros d'inscription !

Possibilité de passer l'examen sur place à Grésillon lors du stage du 6 au 15 juillet

Ekzamensesio de FEI en Marseille

Renée Triolle

La 14-an de Junio en Marsejlo estis organizita regiono sesio de la ekzamenoj de FEI. Bedaŭrinde, nur lernantoj el Tulona areo partoprenis: unu kandidato por la 1a grada, kaj 2 por la duagrada! Do pli da ĵurianoj ol da kandidatoj. Tre intensiva laboro por Petro, kiu trapasis la du nivelojn samtage, do intensive ekzameniĝis de la 9a ĝis la 17a kun manĝopaŭzo, en la loko mem, ĉe CIRA. Ĉiuj sukcesis: gratulojn al ili kaj al iliaj instruistoj.



meze la du kandidatoj
al la 2a grada ekzameno de FEI,
maldekstre Nicole lafitte,
dekstre Renée Triolle

(malvera?) Ĉina proverbo de la monato.


Marc Gallardo

Naskita el jarcentoj da profunda pensado (aŭ almenaŭ el longa atendado en mallumaj ĉambroj), la ĉina saĝo ofertas al ni proverbojn, kiuj klarigas la vivon… aŭ almenaŭ donas la impreson ke ili klarigas ion. Ĉi-monate, ni proponas jenan perlon, kiun mi metis kiel fonbildon de mia komputilo (tre utila por aspekti pensema dum laboro):

“Estas malfacile trovi nigran katon en nigra ĉambro, precipe se ĝi ne estas tie.”

Mi, por simpleco, atribuis ĝin al Konfucius. Se li ne diris ĝin… li certe evitis konfirmi.

“Mi neniam diris tion, sed mi povus esti dirinta ion similan por impresi miajn disĉiplojn.” — Konfucius (laŭ fonto, kiu preferas resti anonima).



Laŭ niaj tre seriozaj (kaj absolute ne kontrolitaj) fontoj, ĉi tiu filozofo pasigis grandan parton de sia vivo serĉante katon en malluma ĉambro.

“Ni ankoraŭ serĉas la katon. Bonvolu ne ĝeni.” — Asistanto de Konfucius, ĉirkaŭ -500 a.K.

Ĉu li iam trovis ĝin? Neniu scias. Ĉu kato entute ekzistis? Eĉ malpli klare. Sed lia persistemo restas inspira.

➤ **Profunda (aŭ ne tro profunda) analizo**

Kompreneble, ni devas provi kompreni la signifon.

- La kato reprezentas problemon.
- La malluma ĉambro reprezentas la mondon.
- La foresto de la kato… nu… reprezentas multajn el niaj kunsidoj.

“Post tri horoj da kunsido, «ni konkludis ke la kato verŝajne ne ekzistas. Sed ni planis novan kunsidon por konfirmi tion.» — Fakulo pri organizaj strategioj

Ni ĉiuj jam renkontis tiun “nigran katon”:

- kiam ni serĉas objekton, kiun ni ĵus havis en la mano antaŭ 10 sekundoj;
- kiam ĉiuj diras: “iu alia zorgos pri tio”;
- kiam la kafmaŝino denove ne funkcias kaj neniu kulpas (certe ne mi).

“La maŝino funkciis perfekte ĝis iu uzis ĝin.”— Nekonata kolego.

Ĉu estas kato? Ĉu hundo? Ĉu nur malbona konekto? Neniu scias. Sed ĉiuj serĉas… kun granda seriozeco.

Eta saĝo (aŭ bela preteksto)

Oni ofte diras, ke oni devas serĉi por trovi , ne serĉi por serĉi aŭ ŝerci.

“Se vi ne trovas, serĉu pli forte. Se vi ankoraŭ ne trovas, klarigu ke la afero estas kompleksa.” — Moderna konsultisto

Sed foje ni simple serĉas… ĉar ni jam komencis serĉi. Kaj plej ofte — ni serĉas en la loko kie estas lumo, ne kie estas la objekto.

“Tie estas pli komforte.” — Ĉiuj laboristoj

➤ Konkludo

Do, kion ni lernas el ĉi tiu profunda ĉina proverbo?

- Serĉi ion, kio ne ekzistas, estas tempoperdo.
- Sed fari tion kun serioza vizaĝo donas al vi aspekton de granda pensulo.



“Mi ne scias kion mi serĉas, sed mi estas kontraŭ ĉesigo de la serĉado.” — Respondeculo pri projektoj

Kaj eble la vera mesaĝo estas pli simpla:

- ridi pri niaj propraj serĉadoj,
- kaj akcepti ke foje… ne estas kato.

Kaj se iu iam diras: “Mi trovis ĝin!” verŝajne li simple enŝaltis la lumon.

“Ah… efektive, en ĝi estis ŝaltilo.” — La sama ulo

Intervjuo kun fakuloj

Por pli bone kompreni ĉi tiun profundan proverbon, nia redakcio kontaktis plurajn fakulojn.

Profesoro pri aplikata filozofio

Ni devas konsideri la eblecon ke la kato estas samtempe tie kaj ne tie.

Tio estas tre grava koncepto… precipe kiam oni ne trovas ion. Laŭ

teorio de la quanta, li povas esti mortinta kaj vivanta samtempe.

Specialisto pri kafmaŝinaj krizoj

“La problemo ne estas la kato. La vera demando estas: kiu laste uzis la maŝinon?”

Konsultisto pri administrado

“Ni rekomendas starigi laborgrupon por difini la katon, alian por lokalizi la ĉambron, kaj trian por pripensi ĉu serĉado estas strategia prioritato.”

Reprezentanto de la hundo (akuzita sen pruvoj)

“Mi ne scias pri kia kato vi parolas. Sed mi firme neas ĉian implikiĝon.”

Spertulo pri lumigado

“Mi proponas revolucian solvon: ŝalti la lumon. Sed mi komprenas ke tio povus detrui la tutan filozofian debaton.”

Moderna pensulo

“La kato estas en vi. Se vi ne trovas ĝin, eble vi ne serĉas en la ĝusta interno.”


Respondeculo pri komunikado

“Ni ne povas konfirmi la ekziston de la kato, sed ni aktive laboras por doni la impreson ke ni serĉas ĝin.”

Redakta noto

Post ĉi tiuj intervjuoj, nia redakcio konkludas ke:

- la kato restas netrovebla,
- sed la fakuloj estas tre okupataj.



Naturistaj esperantaj agadoj pliiĝas en 2026!

Thierry Spanjaard / Prezidanto de INOE

Indas ke oni neniam forgesu ke Esperanto Provence estas la loka Esperanta organizo, kiu membras la plej granda nombro de naturistoj en la mondo. Pro tio indas ke la legantoj de tiu ĉi gazeto informiĝus pri la agadoj de INOE: Internacia Naturista Organizo Esperantista. 2026 estas riĉa jaro por INOE: la asocio neniam havis tiom da agadoj planitaj en unu jaro. La ĉefaj planitaj agadoj estas:

Dum la UK : ni partoprenos en la Movada Foiro sabate, havos nian membrokunvenon, kaj organizos ekskurson al naturista plaĝo apud lago en la ĉirkaŭaĵo de Graz merkrede tuttage,

Tuj post la UK, INOE-anoj partoprenos en la unua eldono de la Tutmonda Nuda Biciklado en Berlino,

Nia ĉefa agado estos la Naturisma Verda Semajno, en la Kastelo Greziljono de la 14-a ĝis la 20-a de Aŭgusto, kie partoprenantoj povos lerni Esperanton nude kaj partopreni en diversaj agadoj,

Ankaŭ post la UK, ni proponos ekskurson al naturista plaĝo en Badalono, Katalunio dum la IJK (Internacia Junulara Kongreso),

Kaj fine, ni organizos nian kutiman septembran restadon en Katalunio en natusimejo Templo del Sol.

Ĉiuj detaloj kaj aliĝrimedoj aperas en nia retejo: **https://www.esperanto-naturismo.org**

Ne gravas se vi ne jam membriĝas en INOE, ĉiu povas partopreni en niaj agadoj se vi ŝatas la agrablan senton esti nuda kaj senti la sunon kaj la venton rekte sur via haŭto.



Kvar prelegoj en du semajnoj

Thierry Spanjaard

Mi ŝatas paroli publike sed kelkfoje eventoj amasiĝas en mallonga tempo. Tiu okazis en majo kaj junio de tiu ĉi jaro.

La Nacia Kongreso 2026 en Herouville estis planita jam de longe. Kiam mi unuafoje aŭdis pri tiu projekto, mi tuj diris al la organizanto: “vi faros kongreson en Normandio: mi pretos prelegi pri Normandaj fromaĝoj!” Li tuj akceptis mian proponon kaj rapide rilatis kun la Defenda kaj Administra Korpo (ODG – Organisme de Défense et de Gestion) de la Kontrolita Originnoma Denominacio (Appelation d’Origine Contrôlée) por obteni ilian subtenon. Tiu estis ege sukcesa: la ODG liveris multajn specimenojn de Normandaj fromaĝoj, por ke ni povus gustumi ilin post la prelego. Tiu temo estis iom pli facile alirebla ol kelkaj aliaj prelegoj dum tiu Kongreso, sed mi estis surprizita de la nombro de partoprenantoj. Ŝajnas, ke ili ŝatis la prelegon kaj eble ege pli ŝatis la gustumadon de fromaĝoj poste.



Ĉar Esperanto Provence preparas multajn agadojn por la venontaj monatoj, la Kongreso en Hérouville estis taŭga okazo por varbi pri ili. Do, mi faris rapidan, ĉar estis dum la lasta posttagmezo, prelegon pri niaj estontaj agadoj : la Kultura Semajnfino (en La Garde, la 7-an kaj 8-an de novembro 2026), la Mediteranea Esperanto-Semajno (en Les Issambres de la 13-a ĝis la 20-a de marto 2027) kaj, ĉefe, la Eŭropa Kongreso de Esperanto 2027 (en Carry le Rouet de la 14-a ĝis la 17-a de majo 2027). Homoj estis intere-



sitaj de mia prelego, eble ĉefe ĉar mi inkludis multajn bildojn de la marbordo de nia alloga kaj sunplena regiono.

Lastan jaron, antaŭ la Universala Kongreso en Brno, Milan Kolka, la kongresejestro, multe helpis min organizi la INOE-an ekskurson apud la akvobaraĵo de Brno. Tiun jaron, li kontaktis min, petanta prelegon pri naturismo por la Esperanto-klubo de Brno. Kompreneble, mi jesis, kaj faris tiun prelegon la 3-an de junio per Jitsi. La celo estis klarigi pri naturismo, ĝia historio, valoroj kaj agadoj, kaj forigi falsajn ideojn pri ĝî. Estis ĉirkaŭ 15 partoprenantoj en la reta prelego. La prelego estas videbla rete ĉe https://youtu.be/LSvJiK3Czdw

Antaŭ kelkaj jaroj, mi jam prelegis plurfoje pri metromapoj. Mi ŝatas la temon ĉar ĝi koncernas ĉiutagan uzon de transportrimedoj, pensojn pri dezajno, esplorojn pri kiel transdoni mesaĝojn grafike kaj efike al la publiko, kaj iasence artaĵon. Maŭrizio Giacometto jam sekvis tiun prelegon kaj petis, ke mi refaru ĝin kadre de la retaj prelegoj de la Londona Esperanto-Klubo. Tiu organizo bone funkcias, estis multe da partoprenantoj en tiu ĉi prelego! La prelego estas videbla ĉe https://youtu.be/FeQjMXCCGfA



Mi pretas refari tiujn prelegojn laŭbezonoj, aŭ eble prepari novajn. Ne hezitu demandi al mi.

Blekoj el bestoj

Vidu la bildon! En la libro de mia nepo, mi trovis artikolon pri la blekoj de nia servobestoj; Koko, anaso, hundo, birdo.

Mi pensis: por esperantistoj ciuj malsamaj vortoj, el diversaj lingvoj, estas absurdaj! Kelkafoje, ni havas unu esperanton vorton KOKORIKO por la koko, KUIKUI por la birdo, Kaj kial ne inventi vortoj por aliaj?


mi proponas :

«ANA» por la anaso - «BOBO» por la hundo

Sinjoro Zamenhof pensis?

Se vi volus elpensi esperantojn blekojn, skribu al la gazeto, ni sendos eble al UEA…

Hi Hi Hi …..



*Lire : kikirikou ! pour le coq et koua koua ! pour le canard.


France
Italie
Espagne
Grande Bretagne
Allemagne
Portugal
Grèce
CLUCK!
Cococo!
Gaker!
CACARACACÁ!
KOKO!
Coccode!
Cot cot codett!
Bau bau!
Guah ouah!
Au Au!
ГАВ ГАВ!*
Wau wau!
WOOF!
Guau guau!
TITITI!
Pip pip!
Cuik cuik!
Piu piu!
Cicip!
Cui cui!
TWEET TWEET!
*Lire : gab gab!

Falsaj amikoj

Jen listo de falsaj amikoj en la franca

(verkis Frédéric Gilles)


Esperanto vorto	Franca traduko	Ne konfuzi kun: Esperanto vorto	Franca traduko
fonto	*source*	**giso**	*fonte (métal)*
		fando	*fonte (action de fondre)*
		degelo	*fonte (des neiges)*
postuli	*exiger*	**kandidati**	*postuler*
kalva	*chauve*	**kalvadoso**	*calva (boisson)*
rido	*rire*	**falto**	*ride*
korbo	*panier, corbeille*	**korvo**	*corbeau*
muso	*souris*	**musko**	*mousse (végétal)*
amo	*amour*	**animo**	*âme*
fosilo	*pelle*	**fosilio**	*fossile*
		falĉileto	*faucille*
grafo	*comte*	**grafeo**	*graphe*
vakcinio	*airelle*	**vakcino**	*vaccin*
cepo	*oignon*	**porcinia fungo**	*cèpe (champignon)*
		vinberarbo	*cep de vigne*
ĉapelo	*chapeau*	**kapelo**	*chapelle*
galo	*bile*	**skabio**	*gale (maladie)*
kolo	*cou*	**kolumo**	*col (de vêtement)*
		intermonto	*col (de montagne)*
gurdo	*orgue de Barbarie*	**akvobotelo**	*gourde*
ligno	*bois*	**linio**	*ligne*
ŝato	*appréciation*	**kastelo**	*château*

Ne konfuzi kun

Esperanto vorto	Franca traduko	Esperanto vorto	Franca traduko
kaso	*caisse (contenant de l'argent)*	**kazo**	*cas*
tondri	*tonner (tonnerre)*	**fako**	*case, compartiment*
daktilo	*datte (fruit)*	**tondi**	*tondre, couper aux ciseaux*
pediko	*pou*	**tajpi**	*dactylographier*
sapo	*savon*	**pedikuro**	*pédicure*
peĉo	*la poix*	**abio**	*sapin*
		peko	*un péché*
		fiŝkapti	*pêcher*
luti	*souder*	**lukti**	*lutter*
bufo	*crapeau*	**bubalo**	*buffle*
konsumi	*consommer*	**forkonsumi**	*consumer*
pavo	*paon*	**pavovo**	*pavot*
		pavimo	*pavé*
ŝamo	*chamoisine*	**ĉamo**	*chamois*
		kamelo	*chameau*
ŝtrumpo	*bas (vêtement)*	**smurfo**	*schtroumpf*
bani	*baigner*	**ekzili**	*bannir, exiler*
bulo	*boule*	**veziko, bobelo**	*bulle*
		betulo	*bouleau*
acero	*érable*	**akra**	*aiguisé, acéré*
eŝafodo	*échaufaud*	**skafoldo**	*échafaudage*

Facila krucvortenigmo

Marc Gallardo



1 - Estas 12 el ili en jaro
2 - La infanoj iras tien
3 - Instrumento kiu kontrolas rapidon
4 - Estas kiam ne plu estas diferencoj
5 - Ili fleksiĝas sed ne rompiĝas
6 - Pluraj ne-plenkreskuloj
7 - La vetero estas bela kiam ĝi estas blua
8 - Mongola tendo
9 - Ni havas multajn el ili kiam ni estas riĉaj
10 - Inter sep kaj naŭ

1- Monato/ 2- Lerneĵo / 3- Radaro / 4- Akordo / 5- Kanoj / 6- Knaboj / 7- Cielo / 8- Jurtaro
9- Monoj / 10- Ok

La panisoj de Estako - *Rosy Inaudi*



Malkovru la recepton de la bongustaj panisoj, marsejla tradicio transdonata de generacio al generacio en Estako. Ili estas unu el la kulinaraj emblemoj de la urbo.

Prepar-tempo: 15 minutoj / **Kuir-tempo:** 5 minutoj

Ingrediencoj :

- 250 g da kikera faruno
- 1 litro da akvo
- 3 kuleroj da olivoleo
- 1 kulero da salo
- olivoleo por fritado

Preparado :

❱ Verŝu la farunon en nealgluiĝeman kaserolon.
❱ Aldonu la malvarman akvon iom post iom, regule movante per ligna kulero, prefere, por eviti la formiĝon de buloj.
❱ Aldonu la salon kaj poste la olivoleon.
❱ Kuiru sur meza fajro, senĉese movante, ĝis la miksaĵo densiĝos (almenaŭ 10 minutojn).
❱ Verŝu la tuton en antaŭe kovrita per filmo pleton. Glatigu la surfacon, poste kovru ĝin per alia tavolo de filmo. Lasu malvarmiĝi.
❱ Poste tranĉu la panisojn laŭ la dezirata formo; tradicie ili estas rondaj. Fritu ilin je 160 °C dum 3 minutoj.
❱ Sekigu ilin per sorba papero kaj servu.
Se vi ne havas fritilon, vi povas friti ilin en pato plena je oleo.

Eta pliaĵo

Preparu malgrandan pistuan saŭcon per kelkaj folioj de bazilio, olivoleo, pinĉeto da salo kaj pipro, kaj iomete da ajlo. Miksu ĉion.
Verŝu la saŭcon sur la panisojn, same kiel oni verŝas ajlan buteron sur viandon. Tiel ili estas eĉ pli bongustaj!

Atentu

La denseco de kikera faruno ne estas la sama kiel tiu de tritika faruno. 250 gramoj da kikera faruno respondas proksimume al 330 gramoj da tritika faruno.

Bonan apetiton

À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques "esperanto" :

1er jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13) - Vidéodrome 2
49 cours Julien - 6ème - *infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)
"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)
infos : Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02

7-8 novembre 2026 - La Garde (83) : Kultura Semajnfino
infos : Marc Gallardo - 06 09 89 09 14 - gallardomarc@ymail.com
https://provenco.esperanto-france.org/2026-11-7-8-Stage-a-La-Garde-83

13-20 mars 2027 - Les Issambres (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno
infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51
https://provenco.esperanto-france.org/2027-03-13-20-Mediteranea

14-17 mai 2027 - Carry-le-Rouet (13) : Eŭropa Kongreso de Esperanto
https://kongreso2027.esperanto-france.org

5 sept. 2026 - La Ciotat (13) / Le Beausset (83) : Forum des associations

En France

Pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon
http://gresillon.org/?lang=fr

Bouresse (86) - Kvinpetalo
http://www.kvinpetalo.org

14-20 août 2026 - Château de Grésillon : Verda Naturisma Semajno
https://www.esperanto-naturismo.org/post/2026-08-14-20-sepa-verda-naturisma-semajno-en-greziljono

Ailleurs en Europe et dans le monde

01-08 août 2026 - Graz (Autriche) : 111e Congrès mondial d'Espéranto
https://uk.esperanto.net/2026/

05 août 2026 - Apud Graz : Ekskurso INOE
infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51

9-16 août 2026 - Tiana (Katalunio) : 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)
https://ijk2026.tejo.org/

12-19 septembre 2026 - Templo del Sol (Hispanio) : Restado en naturista centro - *infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*